**Numero: 271.**
**Decembro: 2014.** **22-a jarkolekto**

# Literaturaj Folioj

# VESPERTO





**Redaktanto:**
**Apáti Kovács Béla**
**Kaposvár**
**Béla király u. 44.**
**H-7400 HUNGARIO**
**Telefono: 82/ 410-664**
**Retadreso: espbela@t-online.hu**
**Eldonanto: Kapoŝvara Esperanto Centro**
**Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet**

# Kristnasko

Ĝi estas la plej bela festo de la jaro. Ĉi festo alportas al ni pacon kaj trankvilon. En nia koro regas amo kaj ĝi donas al nia animo feliĉon.

Ni staras ĉ**e** la ornamita pinarbo kaj antaŭ ni ekaperas la forflugantaj jaroj de infanaĝo ĝis plenaĝaj jaroj, kiam jam ĉio estas tute alia, kiel antaŭ multaj jaroj.

Bone ekripozi unu – du tagojn kaj kredi, ke tie supre en la ĉielo estas io, kio atentas nin, terajn homojn.

Ni amu unu la alian, ke la mondo estu pli bona!

La homaro kuregas al terura katastrofo. De tago al tago ni estos pli proksime al la fino.

Tamen nun ni ne malĝoju. Estas kristnaske, kiam en nian koron ennestiĝas la amo kaj la brilantaj kandelolumoj varmigas nian zorgoplenan vivon.

Dum ĉi festo ni rememoru pri niaj amantaj familianoj, kiuj jam ne povas esti kun ni. Ilin forrabis la morto kaj ili ripozas en la malvarma tombo. Ili neniam povas festi jam kun ni. Vane estas la ploro. En nia cerbo restis nur ilia neforgesebla memoro.

Ni preĝu ankaŭ por ili, kiam noktomeze ni kunmetas niajn manplatojn je preĝo. Ili restu kun ni por ĉiam. En iu tago ankaŭ ni fariĝos nur memoroj en la pensoj de niaj karuloj.

Tiel rondiras la vivo. Oni naskiĝas, vivas kaj mortas. Tamen Kristnasko la festo de la renaskiĝo. Ĉi tage nova vivo naskiĝas el la mallumo.

Nian koron ĉirkaŭbrakumu amo kaj espero. Ni kredu, alvenos iam bela epoko de la homaro, kiam ĉiu estos feliĉa kaj el nia koro malaperos la kolero.

Ho, Kristnasko, alportu al ni tiun ĉi belegan tagon kaj donu al ni forton kaj esperon!

Al ĉiuj legantoj de VESPERTO mi deziras benitajn festotagojn!

-Redaktanto-



# Kristnaska rakonto

La knabeto malgaje sidis en la malhela ĉambro kaj rememoris pri la sunriĉa somero, kiam sia amata patro estis kun li.

Kiom belegaj tagoj estis tiuj. Neniu pensis, ke tiu ĉi feliĉo en iu tago disrompiĝos kaj forflugos la belaj tagoj kaj anstataŭ ili venos malĝojo kaj larmoj.

Li nur sidis senmove en la malhela ĉambro kaj li devis pensi pri sia patro.

Li mortis aŭtune kaj la fabela vivo ĉesis por ĉiam. Lian patron fermis la profunda kaj malvarma tombo.

Al tio ĉi kutimiĝi ne eblas. Mil jaroj ne resanigas la gigantan vundon. Eble iom post iom la doloro iomete mildiĝos, sed dum ĉiu penso tiu ĉi vundo eksangas kaj ege dolorigas la koron.

Por la knabeto ankoraŭ la eventoj estis tro freŝaj kaj li ne povis imagi, ke patro ne ekzistas. Ĉiutage li atendis hejmen.

Ankaŭ nun. Aliaj geknaboj atendas Jesueton. Li havis nur unusolan deziron, revidi sian paĉjon.

Neatendite brila lumo iĝis en la ĉambro. Li devis fermi siajn okulojn. Kiam li malfermis ilin, antaŭ li staris lia patro. Li ne volis kredi al siaj okuloj. Eble li nur halucinas.

La brila lumo malaperis, sed la viro ne. Li staris antaŭ la knabeto ridetante kaj li ekkaresis lian kapon.

-Ne timu, mi estas via paĉjo! Mi venis, ĉar vi tre deziris revidi min.

La knabeto eksaltis kaj demandis:

-Ĉu vi restos kun mi por ĉiam?

-Tio ne eblas – respondis malgaje la viro. – Baldaŭe mi devos foriri, sed sciu, anime mi ĉiam restos kun vi kaj via panjo.

Tio malgajigis la knabeton, eĉ malgranda larmoguto trarulis sur lia vango. Malgraŭ tio tiu ĉi kristnasko estis por li la plej bela, kiun li neniam forgesis.

Pri la renkonto kun sia patro li parolis al neniu. La sekreto restis en lia koro eterna memoro. Neniu kredus lin kaj la plenaĝuloj estus dirintaj: Tion la knabeto nur imagis.

**-Ŝaŝa-**



# Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-
VI-a

Post kelkaj tagoj Johano kutimiĝis al la Luna ĉiutaga vivo. Baldaŭe li jam povis orientiĝi ankaŭ sola en la urbo. Tio ne estis malfacila, ĉar ĉie estis elekronikaj helpiloj, kiuj helpis hejmengvidi la perdiĝantan ulon. Krome ankaŭ la lunanoj estis tre helpemaj, kaj volonte staris je la dispono de la fremduloj.

Malgraŭ la averto de onklino Johano ekiris al la restoracio STELOBRILO. Sur la stratoj estis eksterordinare granda trafiko. En tiu ĉi tempo la homoj amase iradis tien kaj reen ĝuante la agrablan veteron, enspirante la freŝan aeron, kiu ĉie estis sentebla. Tie ĉi ne estis konata la malpura kaj malsaniga aero, kiel sur Tero multloke. La civitanoj de Luno atentis pli bone pri la pureco de aero, akvo kaj grundo. Eble tial, ĉar sur Luno tiuj ĉi estas artefaritaj kaj ili kreis tiun ĉi belegan mondon. Estus laŭdinde se ankaŭ la teraj homoj imitus ilin, sed por ili ĉio estas natura kaj oni pensas, tiu ĉi stato restos por ĉiam kaj oni povas fari ĉion laŭplaĉe sen konsekvenco.



Elinjo jam atendis lin antaŭ la restoracio. Johano vidis de malproksimo, ke ŝi babiladis kun iu. Kiam ili ekvidis lin, la fremda viro rapide foriris.

La junulino estis vestita en la plej moda kostumo. La okuloj de ĉiu viro tuj fiksiĝis al ŝi ekvidante ŝin.

Ankaŭ Johanon surprizis ŝia beleco. Elinjo ĉiam estis belega kaj ĉarma, sed ĝis nun dum iliaj kelkfoja renkontiĝoj li ankoraŭ neniam vidis ŝin tiom admirinda.

Eble tion kaŭzis nur la vesperaj lumoj. Sur tiu ĉi planedo ankaŭ la lumoj estis aliaj, kiel sur la terglobo. Ankaŭ al tio Johano devis kutimiĝi, kio komence estis tre stranga.

Se oni estas en fremda planedo, tiam la unua regulo, neniam oni serĉu la hejmajn aferojn. Espereble plej rapide oni provu alkutimiĝi al la nova vivformo.

-Salut'! – li salutis feliĉe la knabinon.

-Bonvenon! – ŝi diris ridetante. – Ŝajnas al mi, ke vi facile trovis la restoracion. Mi ege ĝojas. Por vi sufiĉis kelkaj tagoj por fariĝi vera lunano. Ĉu ne?

-Tie ĉi la vivo estas facila kaj simpla – respondis kontente Johano. – Ĝi estas pli simpla, ol sur Tero. Laŭ mi tion jam ankaŭ vi spertis. Ja ni kune veturis de Tero al Luno, kiam ni ekkonis unu la alian.

-Vi pravas, kara. Do, mi proponas, ni eniru la restoracion. Mi jam hodiaŭ antaŭtagmeze rezervis tablon por ni.

La restoracio estis luksa kaj mistera. Robotoj estis la kelneroj. Ili fulmrapide plenumis la dezirojn de la gastoj.

Elinjo kaj Johano sidiĝis apud panoraman fenestron, de kie eblis videbla la ĝuste ekaperinta terglobo. Tio estis fenomena vidindaĵo precipe por Johano. Li ankoraŭ ne vidis tiel sian hejmoplanedon. Kompreneble por Elinjo tio ĉi estis ĉiutaga afero. Teron ŝi jam multfoje vidis tiel.



-Kion ni konsumu? – demandis Johano ĉirkaŭrigardante, kiuj estas en la restoracio.

Krom ili estis ankoraŭ kelkaj gastoj. Verdire ne estis tumulto. Ankoraŭ kelkaj tabloj estis liberaj atendante gastojn.

-Ĉu vi estas malsata? – interesiĝis Elinjo. – Mi volonte manĝus ion. Hodiaŭ mi devis labori multege kaj mi enbuŝigis nur sandviĉon tagmeze.

-Ekde kiam mi estas sur Luno, mia onklino dikigas min. En ĉiu horo ŝi demandas: „Ĉu vi ne estas malsata?" Tial mi prefere trinkus ion.


-Bone. Se mi ne ĝenas vin mi mendos vespermanĝon kaj por vi specialan lokan vinon.

-Ĉu ankaŭ vino loka estas tie ĉi? – ekmiris Johano.

-Kial ne? Ni havas belajn kaj grandajn vinoĝardenojn. Se vi deziras, morgaŭ ni povos ekskursi tien.

-Bonege. Mi estas scivolema.

(Daŭrigota)



# Poezio

Ĉu la homo de XXI-a jarcento legos poemojn, versojn? Ĉu ilin interesos la muziko de la sferoj? Aŭ ĉion subpremas la bruoj de la moderna tekniko. La infanoj prefere ludas per komputiloj kaj poŝtelefonoj. Ilin jam ne interesas la poezio.

Estus bone kredi, ke mi eraras kaj ankaŭ en la estonto estos poetoj, kiuj muzikos por ni per la muzikiloj de la vortoj.

Ni ne entombigu la poezion, ĉar ĝi estos bezonata ankaŭ en la nebula futuro.

**-AKB-**

## Cezar

## Pacon ne nur je Kristnasko

Festa familio sidis
apud kristnaskarb' en rond',
kaj neniu tie fridis,
kvankam fridis en la mond'.
Ekjubilis kun favor'
kantoĥor' !

Avo faris festprogramon
kun avino ĉe la flank'.
Ĉiuj sentis iel amon
kaj aplaŭdis tre pro dank'.
Kiam frapis ĉe la pord'
nun kun fort'.

Nikolao mem envenis,
ruĝvestita por la fest'.
Parolante ĉiujn benis,
tre ŝvitante sub la vest' :
„Pacan feston en konkord' !
Mia vort' !"

Sed malgranda knab' sur loko
sin tredadis per pied',
siajn vortojn nur post voko
metis flustre kvazaŭ pet'.
Li demandis kun dolor'
post esplor' :

Kara Nikolao mia,
mankas al la vortoj klar'.
Pacon nur dum festo nia ?
Kial ne dum tuta jar' ?
Kial pacon, ho, sinjor',
nur dum hor' ?

Sankta Nikolao miris,
staris iom en silent',
ĝis li tre solene diris :
„Ho, mi estas en konsent'.
Pacon ĉiam kun fervor',
knab' el or' !"



# Por infanoj

## Kristnasko de la birdoj

Kaj estis kaj ne estis sur la branĉo de alta arbo sidis du birdoj. Ili babiladis pri Kristnasko.

-Ĉu vi aŭdis, la homoj aranĝas en ĉiu jaro Kristnaskon. Ili donacas unu la alian per diversaj, belaj donacoj, eĉ ili starigas ornamitan abion en la domo. Tio ĉi estas tre animagorda kaj belega festo.

-Jes mi scias – respondis la alia birdo kaj ĝi revante rigardis la neĝan pejzaĝon. – Estus bone, se ankaŭ ni farus Kristnaskon kaj ni donacus unu la alian.



-Sed ni estas birdoj. La birdoj ne faras Kristnaskon. Krome ni ne havas ornamitan abion. Ni vivas en la arbaro.

-Ĉu tio estas problemo? Ne forgesu, en la arbaro estas multaj abioj. Rigardu, ankaŭ tie estas unu! Ĝi atendas nin, ke ni ornamu ĝiajn branĉojn.

-Sed per kio ni ornamu la arbon? – demandis interesiĝante la dubanta birdo.

-La arbaro estas riĉa. En ĝi ni trovos multe da ornamaĵoj. Laŭ mi ankaŭ la naturo helpos al ni. La frosto sorĉos diversajn figurojn sur la branĉojn el glacio. Ni petos la stelon, ke ĝi surflugu ĝian pinton.

La ideo tre, tre plaĉis al la alia birdo kaj ĝi volonte apogis sian kunulon.



Ili komencis prepariĝi al Kristnasko. La abio estis elektita. Rapide ili trovis belan, altan arbon. Kiel ili pensis, en la arbaro estis trovitaj multaj ornamaĵoj: sekaj fruktoj, strobiloj, arbofolioj falantaj surteren. Per ili la abio estis ornamita. Ĝi estis tiom belega, ke ankaŭ la homoj povus envii ĝin. Sur ĝian pinton estis metita brilanta stelo.

-Jen nia abio – ĝojegis la birdoj. – Sed kiun ni invitos al la festo?

-Kompreneble la aliajn birdojn, kiuj loĝas en la arbaro kaj sur la kamparo.

Ili tuj anoncis, ke en la arbaro okazos animagorda kristnaska festo. Venis almenaŭ miloj da birdoj. La du festoaranĝantoj tiam tre surpriziĝis kaj ektimis. Sub la abio ne estis donaco. Ili tute forgesiĝis pri tio. En la hejmo de la homoj ĉiam estas donaco. Ili staras tie en grandaj bele enpakitaj skatoloj.

Sub ilia abio estis nenio krom blanka neĝo kaj frosta glacio. La birdoj tre ektimis kaj ili komencis plori.

-Kial ni invitis tien ĉi birdoj, se ni ne havas donacojn? Kion ni donu al ili? Ni estos prirriditaj pro tio kaj niaj gastoj forflugos, se ili vidos nur la abion sen donacoj. Kial ni estis tiom stultaj?

Neniu scias kiom longe ili ploradis kaj amaris, kiam neatendite alflugis ilin strigo kaj ĝi demandis:

-Kial vi ploras karaj birdetoj? Kio okazis?

La birdojn surprizis la demando de la strigo.

-Ni forgesiĝis pri la donacoj sub la abio. Kiel festi Kristnaskon sen donaco? Ni deziris inviti la birdojn de la arbaro. Ni faris belan, ornamitan abion. Jen, rigardu! Sed ni timas inviti birdojn. Ili insultiĝos, se ili ne ricevos donacon.

La strigo ekridis kaj saĝe konsolis la du etajn birdojn:

-Pro tio ne ĉagrenu! Kristnaske ne la donaco estas grava.

-Ne? – ili ekmiris.

-Jes. Tio estas grava. kio kaŝiĝas en via koro. Se tie estas amo kaj paco, tiam ĉiu birdo estos feliĉa kaj volonte akceptos la inviton.

La strigo pravis. Ili invitis la birdojn de la arbaro kaj ĉiuj fartis eksterordinare bonege, ĉar ilia koro tie estis varmeco kaj amo. Neniu serĉis la donacon. Noktomeze ili kune ĝojegis kun la homo, kiam naskiĝis Jesueto.

-Onklo Adalberto-



# Vintra pejzaĝo











# Vintra pejzaĝo









